

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 20-an de aŭgusto 2015 per Skype. (Protokolo aprobita la 24-an de septembro 2015)

Partoprenis:

Anne Karin Bondhus en Bryne
Hilde Dahlberg en Mo i Rana
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Mario Machlik en Tromsø
Herman Ranæs en Trondheim

0. Tagordo

Aprobita kun aldono de tagordpunkto pri Esperantonia.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 30-an de aprilo

Tio estis la lasta interkonsiliĝo de la antaŭa estraro, kaj la protokolo jam estis aprobita rete.

2. Ekonomio

La kasisto raportis pri la ekonomio: Skagen Vekst kr 49 730,- Skagen Høyrente kr 127 528,-

3. Landa Kongreso, pritakso, farendaĵoj

La estraro dankas al la klubo de Trondheim kaj persone al Herman Ranæs pro aranĝo de sukcesa kaj agrabla kongreso en Trondheim.

Anne Karin finskribos la protokolon de la LK post kelkaj tagoj, kaj post la signoj de la subskribantoj (Amelie Matt kaj Ulf Stenhaus) sendos ĝin al la redaktoro de Norvega Esperantisto. Ŝi ankaŭ kontaktos la revizoron, Ulf Stenhaus por ricevi lian raporton pri la jarkalkuloj.

Ni enmetos la ĝustigojn, aprobitajn dum LK en la jarraportojn post la pretiĝo de la protokolo.

4. Planoj por la venonta jaro

-Seminaro: Ni aranĝos perskajpan seminarion fine de oktobro aŭ komence de novembro. Mario verkos artikolon por la membrogazeto por ekhavi proponojn pri la temo de la seminaro.

-Vortaro: Kvankam tio estas projekto de la klubo de Trondheim, ni ŝatus sekvi kiel evoluas tio.

-Broŝuro: Anne Karin kunportis el Francio franclingvajn broŝurojn kiujn ni eble povus adaptigi kaj norvegigi. Ŝi skanos ilin al ni, kaj ni pritraktos tion dum la venonta kunveno.

-Ŝildo en Narvik: Mario informis, ke la trilingva informŝildo pretiĝis kaj jam staras apud la monumento « Esperanto-ŝtono » en la parko apud la stacidomo en Narvik.

5. Landa Kongreso 2017

Anne Karin kontaktos Ingebjørg Rambjør por diskuti alternativojn por ejo de la kongreso. Ankaŭ Ulf Lunde kaj Bård Hekland povus esti kandidatoj por la organiza laboro.

6. Raporto pri la 100-a UK

La plimulto de la estraranoj partoprenis la UK-on en Francio kaj raportis pri agrabla kvankam iom eble tro burokratia UK. Herman Ranæs salutis la kongreson en la nomo de NEL. Jardar ŝatus verki artikolon pri la UK por sia blogo kaj por nia hejmpaĝo kiam li havos tempon.

7. Esperantonia

La estraron atingis maltrankviligaj informoj pri luigo de granda parto de Esperantonia. Ni malcertas, ĉu ekzistas iu oficiala kontrakto inter la luanto kaj la klubo en Oslo, kaj ĉu la kondiĉoj de la luado estas sufiĉe favoraj por la posedantoj de la domo. Mario skribos retmesaĝon al la domkomisiono kaj petas ilin esplori la situacion. Leviĝis la demando, ĉu la domkomisiono havas statuton aŭ ne. Se ne ekzistas tia statuto, tiam ni devas pretigi ĝin por faciligi la laboron de la domkomisiono.

8. Datoj por la venontaj interkonsiliĝoj

24/9, 29/10, 19/11 kaj se necese 10/12

9. Eventualaĵoj

Lars Kåre Hunnes, multjara aktivulo, forpasis en Orkdal la 7an de aŭgusto. Grupo Esperantista de Trondheim sendis ĉerkan florbukedon nome de NEL kaj GET. Jardar kaj Judith Abrahamsen partoprenis la funebran ceremonion.

La interkonsiliĝo daŭris 19:50 - 21:30

La venonta interkonsiliĝo okazos la 24-an de septembro 2015.

Raportis Mario Machlik